Beletra rubriko, el la Festivala Kuriero 2020, # 15, 16, kaj 17

# La bruo el l’ atiko

Originale verkita en Esperanto, de Jose Carrillo (Ĵosefo, Kanado)

Foje malfrue nokte, mia edzino Lea vekis min. Ŝi diris al mi: “Ĵosefo! Ĉu vi aŭdis tiun bruon? Estas io en l’ atiko!” Nenion mi aŭdis. Ankoraŭ nenion mi aŭdis. “Ne zorgu! Estas nenio. Ni reendormiĝu,” mi diris al ŝi.

Ni reendormiĝis.

Kelkajn horojn poste, ŝi revekis min. “Ĵosefo! Mi denove aŭdis tiun bruon! Estas io en l’ atiko! Iru kaj kontrolu tion, kio estas tie.” Mi respondis “Jes, mia kara.” Tiam, mi iris al l’ atiko kun poŝlanterno. Estas malhele ĉe l’ atiko.

“Mi trovis nenion,” mi diris al mia edzino. Subite ni aŭdis kriegon malsupre!

“Paĉjo! Panjo!” mia filino Kajla kriis. Mi kuris malsupren el l’ atiko kaj demandis al Kajla “Kio okazis?”

Plorante ŝi diris: “Mi vidis teruran sonĝon! Mi sonĝis, ke mi flugas per flugiloj, kaj iu sekvas min”.

Mi diris al ŝi: “Ne zorgu! Estis nur malbona sonĝo.”

Ni ĉiuj reendormiĝis.

Matene de la sekva tago, mi vekiĝis antaŭ ĉiuj aliaj. Mi trinkis kafon ĉe la malantaŭkorto.

Subite mi ekvidis tion, kio – mi pensis, – estis fluganta birdo. Tamen, ĝi ne estis birdo.

* * *

Ĝi flugis kvin foje ĉirkaŭ la malantaŭkorto. Mirige estis vidi vesperton malfrue matene. Estis sune, kaj vespertoj estas noktaj bestoj.

Neniam mi vidis vespertojn dum miaj dudek jaroj en Kanado. Ĉi tiu vesperto aspektis juna kaj perdita. Eble ĝi perdiĝis hieraŭ nokte, kiam ĝi ĉasis. “Ĉu ĝi ne plu povas trovi sian loĝejon?” mi pensis.

Subite, ĝi flugis al eta breĉo inter la brikoj de la malantaŭmuro kaj la tegmento, poste ĝi rampis tra truo en mian domon.

“Ho ve! Ĉi tiu vesperto loĝas en mia hejmo! Ĝi loĝas en l’ atiko!”

Nur tiam mi komprenis la bruon, kiun mia edzino aŭdis hieraŭ nokte. Estas vesperto en l’ atiko!

Mi vekis mian edzinon kaj diris al ŝi pri la vesperto. Ŝi kriegis!

Tuj ŝi petis min voki la plagokontroliston.

Mi telefonvokis la plagokontroliston. Lia nomo estis Benjameno. Mi eksplikis al li

pri la vesperto, kiun mi vidis dum tiu mateno.

Benjameno diris: “Ĵosefo, ne zorgu! Mi estas profesia plagokontrolisto, kaj mi jam kontrolas vespertojn en domoj dum dudek jaroj.” Li klarigis, ke vespertoj loĝas inter ni. Speciale li menciis la grandajn brunvespertojn. “Multaj homoj ne scias, ke hodiaŭ ili havas vespertojn en sia domo, ĉar vespertoj estas noktaj bestoj, kaj ili moviĝas silente.”



Li daŭrigis: “La granda brunvesperto estas sukcesa rakonto. Ĝi povas eniri breĉojn malpli grandajn ol 25 mm longe je 6 mm alte. Ili povas vivi en kavernoj, tuneloj, arbotruoj kaj multaj homaj konstruaĵoj, kiel via domo!” Li ridis.

Tamen, la plagokontrolisto menciis, ke estis stranga maniero, dank’ al kiu mi eksciis pri la vesperto.

Malofte vespertoj flugas dum la tago. Li diris, ke pli ofte homoj vokas lin, kiam estas jam malfrue, kaj kiam ili jam havas flugantan vesperton ene de la domo.

Li diris, ke laŭleĝe li ne povas mortigi la vespertojn. Do li metos unudirektan pordon ĉe la truo, per kiu la vesperto eniris l’ atikon. Tiamaniere la vespertoj povos eliri el l’ atiko, sed ili ne povos reeniri.

Li eksplikis, ke preskaŭ ĉiutage vespertoj devas forflugi de la domo por trovi akvon, aliamaniere ili mortus pro senhidratiĝado.

Finfine li diris: “Ne zorgu! Dum du aŭ tri tagoj, pro la nova unudirekta pordo ĉe la truo, ĉiuj vespertoj foriros.”

Mi ekkriis “Ĉiuj vespertoj!” Mi daŭrigis: “Ĉu povas esti pli ol unu vesperto? Mi vidis nur unu vesperton flugantan en l’ atikon.”

Benjameno ekridis kaj respondis: “Kie oni vidas unu vesperton, tie estas multaj vespertoj!”

“Ho ve!”, mi diris al mi mem.

* * *

Bedaŭrinde, la sekvan tagon ne povis veni al la domo la plagokontrolisto, ĉar okazis malbona vetero.

Post la matenmanĝo, Kajla diris al mi: “paĉjo, mi multe legis pri la vespertoj. Ĉu vi scias pri ilia bonfaro al la naturo? Ili manĝas multajn insektojn kaj polenas florojn.”
Strange! Ŝajnis al mi, ke Kajla antaŭnelonge timis vespertojn, kaj nun ŝi pensis, ke vespertoj bonfaras.
Mi respondis: “Ĉu vere? Malgraŭ tio, ke ili bonfaras, kaj ke neniam ni uzas l’ atikon, mi ne volas, ke ili loĝu kun ni”.
La vetero malboniĝis. Ekpluvegis. Estis multaj fulmoj kaj tondroj. Subite elektran energion perdis la domo. Ĉio malŝaltiĝis. Estis tago, sed ni ne povis fari multe sen elektra energio.
Kajla kaj ŝia frato Ĵosefeto kartludis kun sia patrino. Mi kuŝis sur la kanapo kaj ekdormetis. Mi eksonĝis.

Estis nokto. Ni povis denove aŭdi la bruon de la vesperto. Mia edzino petis min: “Iru al l’ atiko kaj timigu la vesperton!” Mi respondis: “Sed mia kara, la plagokontrolisto venos morgaŭ!”

Ŝi denove diras al mi: “Iru!” Mi iris al l’ atiko. Komence, mi vidis nenion.



Poste mi vidis ion, kio timigis min! Ion kio multege timigis min!

* * *

Ĉirkaŭita de fumo, Kajla staris ĉe l’ atiko, kaj ŝi diris: “Saluton, Paĉjo!”
Mi ekkriegis! “Ho, mia kara! Ni ne havas vespertojn ĉe l’ atiko. Ni havas vampirojn! Kaj Kajla estas vampirino!”
Kajla diris per kaverna voĉo: “Paĉjo, ĉu vi memoras mian sonĝon? Mi flugis per flugiloj. Jes, mi ja estas vampirino! Kaj mi estas tiu, kiu faras la bruon en l’ atiko!”

Ŝi daŭrigis: “Mi ankaŭ sonĝis, ke iu sekvas min! Estis vi, kara paĉjo, kiu sekvis min! Vi sekvis min al l’ atiko! Sed ĉi-foje, mi trovis vin unua!”

Tiam, ŝi rapide alproksimiĝis al mi, kaj ŝi estis mordonta mian kolon! Mi kriegis!

* * *

Subite Kajla mem vekis min. Ŝi diris al mi: “Paĉjo, paĉjo, vekiĝu, vekiĝu! Vi terursonĝas.”
Daŭre mi kuŝis sur la kanapo. Elektran energion reekhavis la domo. La televido ŝaltiĝis.
Mi diris al Kajla, ke mi dormetis kaj terursonĝis pri la vesperto.
Ŝi diris al mi: “Ne zorgu! Estis nur malbona sonĝo. La plagokontrolisto venos morgaŭ, kaj la vesperto baldaŭ foriros.”
Tiam, ŝi forpaŝis kaj demone ekridetis.